

## Universitata Profesoro Kenjo OSSAKA en Tokio 76-jara

(ISAE — TC — 114)

Konsiderante la alproksimiĝon de la **50a U. K. en Tokio** estas juste kaj honeste, memori pri tiu veterano kaj merita pioniro de la Esperantomovado, kiu nun estas 76-jara.

Kenji O s s a k a naskiĝis en 1888, esperantiĝis en 1906, refondis **Joksukan Esperantistan Societon** en 1907, eldonis **»La orienta Stelo«** 1911—1916, redaktis **»Japanan Esperantiston«** en 1916—1919, fondis **»Japanan Esperanto-Instituton«** kun ĝia organo **»La revuo Orienta«** en 1920. Li verkis multajn librojn, inter kiuj: **»Perloj el la Oriento«**, 1921; **Plena Kursolibro**, 1924; **Malgranda Monografio pri Esp. Prepozicioj**, 1943; **»El Orienta Florbedo«** (poemaro), 1956; 505 **»Elektitaj Poemoj el Mannjooŝuu«**, 1958.

Precipe meritaj estas ankaŭ liaj verkaĵoj en la teknikascienca kampo. Ekz-e en 1929 li publikigis, kiel meĥanika inĝeniero de vagonkonstruo ĉe la Ministerio de Fervojoj en Tokio, okaze de la World Engineering Congress Tokyo, 1929, 11-paĝan Esperantlingvan disertacion **»Novaj Paŝaĝeraj Vagonoj de Japanaj Ŝtatfervojoj«**. — En 1962 aperis en Tokio ampleksa japanlingva lernolibro **MEKANISMO, CORSO FUNDAMENTA**, verkita de K. O s s a k a kaj S. T a k a t a. Tiu scienca verko estas presita per japanaj presliteroj kaj pritraktas la teorion de la teknika mekaniko, do la movon en maŝinoj kaj mekanismoj, kun multaj desegnaj klarigoj. La ĉefaj ĉapitroj temas pri la transmisio de movo per frotradoj, per ŝraŭbo, per dentoradoj, per kamoj, per ĉirkaŭvolvanta rimenoj, ŝnuroj aŭ ĉenoj kaj per kulisaroj (kinematika ĉeno, kvaropa krankĉeno, mekanismo kun turniĝanta glitpeco, mekanismo de genule vumilo ktp.). — Por ni Esperantistoj ĉi tiu verko estas precipe grava, ĉar ĝi enhavas Indekson de la uzitaj terminoj, al kiu la verkintoj aldonis ankaŭ la **anglan** kaj la **esperantan** tradukojn. Tial la verko povas servi kiel fidinda bazo de angla-esperanta fakvortaro de la **TEKNIKA MEKANIKA**.

R. H.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio  
Esperantista, Vol. 15, n-ro 3/4 (1965)

535.63/64 + 5.002.61

## LA FIZIKA BAZO DE LA KOLORMONDO

(De Wolfgang Ehrenberg, Germanio)

Konsiderante ke ni ĉiuj vivas ĉiam kun koloroj, ĉiu povus esti spertulo pri tiuj fenomenoj, sed fakte la plej malmultaj meditas pri ili. Eĉ la lernolibroj ofte enhavas asertojn, kiujn ĉiu leganto povus refuti pro siaj propraj malaj observoj, Ekzemple la tezo, ke la pluvarko enhavu sep kolorojn. Kial 7? Ĉar la gamo enhavas 7 tonojn kaj ĉar 7 estas rigardata sankta nombro. Sed se vi specifas 7, vi vidus, ke vi denombros la bluan duoble. Fakte ne ekzistas tiel preciza dividebleco en la videbla spektro kiel en la muziko ene de 1 oktavo. Proksimume la spektro estas kontinua. La unua simileco inter muzika oktavo kaj la videbla parto de la lumondoj estas tiu, ke ambaŭ havas preskaŭ la saman amplekson laŭ proporcio de 2:1 inter la plej longa kaj la plej mallonga ondoj, kaj ke la kvalitoj de la 2 finoj alproksimiĝas unu la alian. Pli preciza observo montras en la spektra kontinuo de la videbla oktavo 3 kolorojn, kiuj aspektas precipe unuecaj kaj stabilaĵ: flava, kiu inklinas nek oranĝkoloron nek verdon, blua, kiu inklinas nek violkoloron nek verdon, kaj ruĝo sen oranĝ aŭ violkolora-inklino. Ankaŭ la korespondaj malaj kolorimpresoj: verdo t. e. malruĝo, violkoloro t. e. malflavo, kaj oranĝkoloro t. e. malbluo, montras ion de tiu unueco kompare al iliaj apud koloroj. Kontraŭe la interkoloroj oranĝflava, oranĝruĝa, violruĝa, violblua, bluverda kaj verdflava havas kunmetitan, vacilantan, fluantan karakteron. Do oni povus motivigi 6-oblan aŭ 12-oblan partigon de la kolorcirklo, sed neniam 7-oblan. Alia diferenco inter akustika kaj optika sentoj estas la fandiĝo de diversaj samlokaj koloroj al nova koloro, dum ke akustike oni povas diferencigi variajn samtempajn sonojn el la sama direkto.

Ĉar la aro de la koloroj estas cirkle fermata per la violruĝa miksaĵo de la violkolora kaj ruĝa finoj de la videbla spektro, estus pli juste paroli pri kolordirektoj anstataŭ pri kolortonoj. La flavdirekto, t. e. la meza de la 3 precipaj kolordirektoj, korespondas en sunlumo,